


# Eŭropa Bulteno

Julio-Aŭgusto 2013, Numero 129

## DUM LA NAŬDEKOKA UNIVERSALA KONGRESO EN REJKJAVIKO OKAZIS KELKAJ EEU-KUNSIDOJ

La unua fermita asemblea kunveno okazis dimanĉon la 21-an de julio en impona salono je la 6-a etaĝo de la kongresejo HARPA vidalvide de la haveno kun belega ĉirkaŭrigardo al Rejkjaviko. Bedaŭrinde ĉeestis malmultaj asembleanoj, ĉu pro aliaj interesaj konferencoj (kongresa temo kaj Internacia Kongresa Universitato), ĉu pro alia kaŭzo?!




La vicprezidantino prezentis la agadon de EEU dum 2012 kaj la bilancon. La asembleanoj faris plurajn demandojn pri la financoj kaj poste akceptis la finanĉan raporton per 11 voĉoj por kaj 2 sindetenoj. Pro la malfacileco akiri la pagon de la jaraj kotizoj de kelkaj Landaj Asocioj al EEU, venis la propono por starigi novan kotizon cele al finanĉa partopreno de individuaj membroj de EEU. Tamen praktika realigo de tiu nova speco de kotizo povas bremsi la organizon. Iuj membroj proponis ke komence de ĉiu jaro EEU sendu fakturon pri la jara kotizo al ĉiuj Landaj Asocioj de EEU. La agado de EEU en 2012 multe impresis la ĉeestantojn, aparte la Konferenco en Triesto kaj la nova projekto 3828 de la Eŭropa

Komisiono Lingvo.info. La membroj ne komprenis ke kelkaj Landaj Asocioj de EEU ne partoprenas al la financado de sia internacia asocio, kiu tiel internacie agadas kaj reklamas Esperanton.

Dum la dua malferma kunveno lundon posttagmeze Sinjorino Barbara Pietrzak, estraranino de UEA, transdonis al sinjoro Milos Bloudek de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio la Premion Cigno pro ilia laboro pri informado pri Esperanto en sia lando. Ĉi-okaze sinjorino Barbara substrekiis la gravecon de partopreno de la Landaj Asocioj de EEU en tiu prestiĝa konkurso. Sekvis diskuto kiel propagandi Esperanton al pli vasta publiko en ĉiuj eventoj.

Vendredon posttagmeze la 26-an de julio estis anoncita kunveno pri la Eŭropa Himno. Feliĉe tiam ĉeestis multaj homoj. Ni komencis la kunvenon per la unua parto de la DVD pri la Eŭropa Himno. Tiu himno ricevis entuziasman aplaŭdon. Tuj homoj volis aĉeti la DVD-n, sed ni klarigis ke tio estis la unua parto kaj ke ekde nun ni intencas aldoni plian parton pri la 28 landoj de la Eŭropa Unio.

Pro malgranda ĉeesto dum la dua kunveno mi reprenis la samajn temojn: agado kaj financoj en 2012. Revenis la samaj demandoj kaj la samaj kritikoj (probable de homoj kiuj ne scias kiel arde laboras EEU!). Ankaŭ Petro Balaž parolis kaj prezentis la 10-an EEU-kongreson en Rijeka en 2014. Li aldonis klarigojn pri la projekto Lingvo.info (numero 3828) financata de la Eŭropa Komisiono.



Kiel rezulto de niaj tuttempaj agadoj kaj lobioj mi donis la ekzemplon de la fama ekspozicio en la Eŭropa kvartalo de Bruselo "Domo de Eŭropa Historio en Ekzilo". Tiu ekspozicio estis realigita de neesperantistoj, kaj temas pri Eŭropa Unio en 2063, do post 50 jaroj. La ĉefa lingvo estas Esperanto kun tradukoj en la nederlanda, la franca kaj la angla. Sed ĉiuj montriloj en la ekspozicio mem estis nur en Esperanto. Do Esperanto estis nature kaj

memkompreneble uzita kiel taŭga lingvo en tiu multnacia ekspozicio. Evidente la aŭtoro volis simbole montri ke al EU mankas komuna lingvo, kion oni en estonto solvos. Kiam mi vizitis la ekspozicion mi parolis kun la inicianto Thomas Bellinck kaj demandis kiel li tradukis ĉar li ne konas esperanton; simpla respondo: pere de Google kaj tio klarigas la erarojn en la tekstoj. Tamen nur ni, esperantoparolantoj, tuj vidas la erarojn, sed la aliaj vizitantoj tute ne konscias pri tio kaj miras ke Esperanto estas normala lingvo kiu povas klarigi eĉ la plej tiklajn situaciojn. Poste mi reŝendis al ĉiuj ĉeestantoj kaj la Eŭropan Himnon kaj folion pri la ekspozicio. Pro granda sukceso la ekspozicio remalfermos siajn pordojn dum la tuta monato septembro 2013.

[http://www.kvs.be/index2.php?page=program&vs\\_id=802&lng=ENG](http://www.kvs.be/index2.php?page=program&vs_id=802&lng=ENG)

Flory Witdoeckt, vicprezidantino de EEU

## SEPA SES (SOMERA ESPERANTO-STUDADO) EN MARTIN, SLOVAKIO

Invitita de organizantoj (E@I) mi partoprenis inter la 12-a kaj 20-a de julio 2013 en slovakia urbeto Martin en la sepa Somera Esperanto-Studado (SES). Ĝi vere estis tre agrabla surprizo por mi. Partoprenis ĉirkaŭ 250 personoj el 27 landoj, kio estas proksimume same granda kiel Eŭropaj Esperanto-kongresoj kaj eĉ nuntempaj TEJO-kongresoj. Kaj grandparte temis pri junaj personoj. Surpriza por mi ĝi estis ĉar ĝi estas tre interesa kombino de klasika esperantista internacia aranĝo kaj serioza lernado. Kutime tiuj du aferoj ĝis nun estis disaj. Aŭ temas pri labor-amuz-turisma aranĝo aŭ pri serioza studa aranĝo.



Dum SES praktike ĉiuj partoprenantoj krom la invititaj instruistoj kaj kulturartaj plenumantoj de la vesperaj programoj lernis. Estis organizitaj preskaŭ ĉiunivalaj E-kursoj de A-1 ĝis C-1 (nur C-2 mankis). Kaj tio kio min aparte surprizis estis disciplino kun kiu a partoprenantoj vizitis la kursojn. La antaŭtagmeza programo estis ekskluzive la lerna programo. Kursoj daŭris de la 9-a matene ĝis la 13-a horo, tre intense. Kun paŭzo de unu horo oni lernis ĉiutage dum plenaj kvar horoj. Mi kaj Stano Marĉek gvidis du plene porkomencantajn kursojn (A-1), li laŭ la rekta metodo kaj mi laŭ la Zagreba Metodo. Ni ambaŭ havis po proksimume 20 gelernantojn kun tre bunta konsistantaro. En mia kurso ĉeestis personoj el 8 landoj kaj en la aĝo de 10-jarulino ĝis 82-jarulo. Tio estis por mi aparta defio, ĉar instrui al tiel diferenca grupo de komencantoj sen povi lingve komuniki kun ili estis aparte postula afero. Mi kredas, ke mi faris tion sukcese (la kursoj daŭris dum 7 tagoj) kaj ke la plimulto de la partoprenintoj (speciale tiuj kiuj frekventis ĝin regule) akiris adekvatan kaj priatendatan scion kaj kapablon. Bone faris la organizantoj kiuj zorgis ankaŭ pri helpantoj por la kursgvidantoj (la mia estis Carles Sole el Katalunio). Kompreneble, helpis ege la postaj posttagmezaj kaj vesperaj programoj: kulturaj, sportaj, amuzigaj kaj simple amikumaj en la gufujo kaj trinkejo, ene de kiuj ili povis tuj apliki siajn sciojn. Mi esperas ke la plimulto el la kursanoj venos ankaŭ al la sekva SES por daŭrigi en A-2-nivela kurso. Ankaŭ en aliaj kursoj estie ege kompetentaj kursgvidantoj, pri kiuj oni povas diri nur laŭdajn vortojn.

Kiel dirite, SES abundis de kulturaj eventoj. En ĉiu vespero okazis minimume 1, foje eĉ du koncertoj de konataj Esperanto-kanzongrupoj aŭ unuopaj kantistoj. Pluraj kiuj apartenas al

plene juna generacio inter kiuj Jonny M ŝajnis al mi plej profesia kaj spontana nova stelo en tiu ĉi E-amuzmuzika kampo.

Kiel kutime ankaŭ ĉi-tie unu tago estis plene dediĉita al ekskursoj (la centra ekskurso kondukis la partoprenantojn al altaj Tatroj). Sed okazis ankaŭ pluraj duontagaj ekskursoj al diversaj lokoj de relativa ĉirkaŭaĵo. Vespere kaj nokte (pli-malpli ĝis la 4-a matene) funkciis la gufujoj (senalkohola babilejo) kaj bufedo kaj dumtage libroservo. Interesaĵo estas ke oni enkondukis uzon de esperanto-mono: stelo. Oni povis aĉeti plastajn stelmonerojn komence de



la aranĝo kaj poste uzi ilin en ĉiutagaj bezonoj. La organizantoj zorgis ankaŭ pri iom nekutimaj aranĝoj, kiel la gustumado de la regionaj vinoj inkluzive de loka mielbrando kaj pri disiĝa regalo. Estis je dispono multaj ebloj sporti por gejunuloj: de tabloteniso ĝis futbalo. Ankaŭ regule oni povis en aparta ĉambro spekti dekon da profesiaj filmoj subtitolitaj en Esperanto. Ĝojiĝis min la fakto ke partoprenis ankaŭ respektinda nombro de azianoj kaj amerikanoj tiel ke la

aranĝo tute ne estis nur eŭropeca.

La organiza teamo konsistanta el deko da gejunuloj kiujn organizis E@I bonege ĉion preparis kaj organizis. Oni disponis pri modernaj teknologiaj iloj, pri sufiĉe multaj klasĉambroj, pri la koncertejoj, amuzejoj, sportejoj kaj dormoĉambroj. Ĉio okazis en du apudaj domoj de la studenta hejmo kaj mezlernejo, tiel ke ĉio povis esti tre facile majstrata.

Mi kunkondukis unu junan kursaninon el Slovenio por kiu tio estis la unua internacia renkontiĝo kaj kiu kun entuziasmo vitis A-2 kurson kaj ŝi estis ravita pri la aranĝo kaj ankaŭ mi estas tre kontenta pro ŝia lingva progreso.



Mi dankas al E@I kaj al ties ĉefo Petro Balaž por vere modela aranĝo por subteni novajn esperantistojn, ĉefe tiujn kiuj lernis E-on per la reto, per [www.lernu.net](http://www.lernu.net) kaj aliaj retkursoj. Reklamu la aranĝon kaj venu ankaŭ vi en la sekva jaro al slovaka urbo Nitra (sufiĉe proksima al Bratislavo). Ĝi okazos tuj post la Eŭropa Esperanto-kongreso en Rijeka), de la 12-a ĝis 19-a de julio kaj vi povos poste ankaŭ daŭrigi al Argentino, se vi tion planas.

Zlatko Tišljarić

## **KION ESPERANTISTOJ FARU OKAZE DE NOVA INICIATO PRI KOMUNA EŬROPA RADIO**

Rinaldo de Padova raportis ke Italio en la dua donjaro 2014 estos la laŭvica prezidanta lando de la Europa Unio. Prepare al tiu tasko la itala ĉefministro anoncis ke Italio proponos komunan radi-televidan servon en la tuta Unio, startante eble de radia servo.

La itala ĉefministro precizigis ke "bone funkcia Eŭropunio bezonas efikan komunikadon kun la civitanoj, ĉar la nuntempa eŭropa fragmentiĝo ne helpas la naskiĝon de komuna publika opinio, kiu devus esti unu el la ĉefaj celoj de la estonto". Kaj ke „komunikado estas fundamenta" por la Unio.

Ŝajnas al mi tio tre bona okazo por ni esperantistoj ion lanĉi inter la unuaj. Nome de la 6-a ĝis la 12-a de julio 2014 okazos en Rijeka, Kroatio la 10-a kongreso de EEU kies ĉeftemo estos "Justa Eŭropo kun justaj lingvaj rilatoj, pli racia demokratia komunikado", ĝuste en la komenco de la itala prezidanteco. Lige al la ideo pri komuna Eŭropa Radio, eble la italaj esperantistoj povus kontakti homojn kiuj laboros pri tiu komuna radio por tuj establi rilatojn kun Radio Rijeka kaj kroata RTV por rekte raporti pri la laboro de la kongreso. Ili povus intervjui la prelegantojn pri la temo ktp. Kaj la temo estas ege aktuala ĝuste rilate la ideon: kiel ja komunikos la komuna radio? Ĉu nur en la angla? Tiel Kroatia Radio-Televideo havus gravecon ĉar ĝi partoprenus en la komenca konstruado de tiu ĉi ideo pri komuna eŭropa radio kaj ankaŭ Esperanto gajnus iun rolon en tiu komenca fazo de la afero.

Mi kredas ke ekzistas kapablaj homoj en Italio por ekokupiĝi pri tio. Necesas tuj agi, jam nun kiam ankoraŭ oni ne havas establitan teamon, ĉar tiel oni povas influi eĉ al tio ke iu esperantisto iĝu profesie aganta en la projekto. Mi mem kaj aliaj kroataj esperantistoj reagos rapide kaj plu kontaktos la kroatajn instancojn, se venos la unua konkreta iniciato de italaj esperantistoj kaj italaj instancoj.

Siatempe kiam Slovenio prezidis, EEU fakte organizis retradukon de multaj novaĵoj aperintaj en oficiala informretejo pri la prezidado al kelkaj lingvoj kiuj kadre de la prezidado ne estis uzataj. La retejo kutime uzas nur la lokan lingvon (ĉi-kaze la italan), la anglan kaj la francan. Ankaŭ tiusence la itala E-movado devus sin prepari kaj oferti tiun servon. Ne eblas retraduki ĉion ĉar en tiu informretejo aperas ĉiutage novaj informoj, sed eblas elekti redaktejon esperantistan, kiu elektos plej gravajn novaĵojn kaj aperigos ekzemple monatan elĉerpaĵon en Esperanto kaj per reto de kelkaj e-tradukistoj en 5-6 aliaj lingvoj. Ni siatempe trovis fidindajn tradukistojn por la nederlanda, germana, ĉeĥa, pola. Kaj certe ni nun havos ankaŭ por la kroata kaj slovena, eble kelkaj aliaj.

Zlatko Tišljarić

## **POLA ESPERANTO-KONGRESO 2013**

De la 27-a ĝis la 29-a de junio 2013 okazis Pola Esperanto-Kongreso en urbo Lodz. Partoprenis proksimume 150 personoj. En la programo estis pluraj prelegoj pri aktualaj temoj kaj abunda kultura programo. Ne mankis libroservo kun riĉa oferto. Pola EDE havis diskutprogramon pri la propono de teksto kiun oni proponos al pola prezidanto de la Senato

Witbrodt ke li klopodu atingi ties oficialigon en la Pola Sejmo pri tio ke Pollando agnoskas Esperanton kaj ties atingojn kiel kulturalan heredaĵon de Pollando.



La Pola E-organizo ankoraŭ ne plene solvis sian neklaritan juran pozicion. Ankoraŭ en jarkomenco oni elektis novan estraron kiun prezidas sinjoro Stanislaw Mandrak kaj tion la kongreso konfirmis. Tamen oni ankoraŭ atendas ke la ŝtato konfirmu kaj oficiale registru novan statuton de la asocio ekde kiam efektive la

pola movado povos labori pli efike.

Mi prelegis pri grupa identeco kaj lingvo. Partoprenis ankaŭ deko da eksterlandanoj el kelkaj landoj.

Zlatko Tišljar

## TRIA KUNSIDO DE LA TEAMO PRI LINGVO.INFO



La tria kunsido de la teamanoj el 8 partneraj organizoj por la projekto Lingvo.info okazis inter la 30-a de junio kaj 2-a de julio en Poznan (Pollando). Organizis ĝin la pola partnero Universitato de Poznan. Partoprenis 14 teamanoj kaj diskutis la lastajn elementojn pri la aspekto de la paĝaro kiu konsistos el tri partoj:

lingvopedio (informoj amuzaj pri dudeko da lingvoj), babilono (informoj pri la lingvorilataj aferoj) kaj ludoj (ludoj allogantaj al lingvoj). Oni ellaboris detalojn kaj starigis la taskojn. Lingvopediaj informoj devas esti pretaj ĝis aŭtuno.

Maja Tišljar

## PREMIO CIGNO 2013



Dum la ĵus finiĝinta Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko estis transdonita la Premio Cigno 2013 al Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA) pro ilia modela laboro pri nacilingva informado pri Esperanto pere de fakaj revuoj, prelegoj, kulturaj eventoj, ĵurnaloj, radio kaj televido.

La premio konsistanta el mono (la egalvaloro de JPY 200,000), diplomo kaj japana suveniro estis transdonita de unu el la estraranoj de Fondaĵo Cigno, s-ino Barbara Pietrzak dum la publika kunsido de la Eŭropa Esperanto-Unio al reprezentanto de ĈEA, s-ro Miloš Bloudek.

Ĉiuj Landaj Asocioj en la Eŭropa Unio estas invitataj partopreni la sekvan konkurson.

Ayako Kawakita (Prezidanto)

## NOVAJ LIBROJ EN LA SCIENCA KAJ TEKNIKA E-BIBLIOTEKO STEB



Lingvon oni lernas por utiligi ĝin. La uzado en sciencaj kaj profesiaj kampoj tamen postulas – krom la entuziasmo – ankaŭ terminarojn kaj fakajn esprimojn. Antaŭ ol verki iun ajn sciancajn aŭ fakajn artikolojn oni devas konatiĝi kun la jam ekzistantaj terminoj, fakaj esprimoj kaj parolturnoj.

Ĉe "Scienca kaj Teknika Esperanto Biblioteko", STEB estas kolektataj esperantlingvaj teknikaj kaj natursciencaj artikoloj, verkoj kaj elektronikaj libroj. Liston de nove aldonitaj libroj ni publikigas de tempo al tempo en interretaj retlistoj kaj pere de Ret-Info. Se vi konas sciancajn, teknikajn verkojn, ne registritajn ankoraŭ en STEB, kun danko ni akceptas vian informon pri ĝia reta trovadreso, aŭ rekte ĝian dosieron mem.

STEB estas funkciigata de "Esperanto-Centro Eventoj" en Budapeŝto, kaj ne ricevis eksteran financon subtenon nek de landa asocio, nek de E@I aŭ ESF, nek de aliaj instancoj.

Adreso de STEB estas: <http://www.eventoj.hu/steb/>

Oficejaj kunlaborantoj: Szilvási László kaj Mészáros István, kontakto: [oficejo@eventoj.hu](mailto:oficejo@eventoj.hu)

Szilvási László

**ISTVAN ERTL – EN MULTAJ MILOJ DA EKZEMPLEROJ**

La plej konata kaj populara hungaria taggazeto Népszabadság aperigis okulfrapan, tutpaĝan (!) artikolon kun granda fotografajo pri Ertl István, konata hungara esperantisto, eksa redaktoro de revuo Esperanto.

La artikolo rakontas pri lia ĝisnuna vivovojo, agado, kono de multaj lingvoj, ne flankenpuŝante ankaŭ la Esperantan... :-)

La artikolo videblas/legeblas en la reto ĉe:  
<http://nol.hu/mozaik/20130603-ezernyelvmester> --  
 Majstro de mil lingvoj, 34 procente hungaro, 33 procente franco, 33 procente esperantisto, kaj 0 procente rasisto...

László Szilvási

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

Finredaktita: la 31-an de aŭgusto 2013

Redaktoro: Zlatko Tišljarić

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Maja Tišljarić, Flory Witdoeck, Ayako Kawakita kaj Szilvási László.

Kontakto: [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

